

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 6 (79) decembro 2013

Nikolao Gudskov – 60-jara!



en la numero

*invitoj al MEK-7, EsPrimo-10, TEMoj-2, APERO-8
rakontoj pri Esperantaj renkontiĝoj, festivaloj, vojaĝoj
historio de la Zamenhof-festo
nova redaktoro de “Esperanto”
novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ
“Bulteno de REU”, novaĵoj kaj multo alia*

Moskvo, 2013

enhavo

- 01 *EsPrimo-10*
- 03 *Literatura konkurso*
- 03 *Deklamkonkurso*
- 04 *Metiumu en TEMoj (M.Bronštejn)*
- 06 *“Aŭtuna kuko” novembre en Jekaterinburg (R.Kudrjavceva)*
- 08 *La Internacia Lingva Festivalo en Ĉeboksari (T.Stepanova)*
- 09 *Nur ALTE! (L.Novikova)*
- 11 *Impresoj pri ALTE (A.Lebedev, I.Konopljanova)*
- 12 *Prefikse uzataj E-vortoj (parto 9)*
- 17 *Rememoroj pri la somera vojaĝo (L.Jeroŝejeva)*
- 19 *Venu aprile al Tbilisi (N.Ĥizambareli)*
- 20 *Historio de la Zamenhof-festo (V.Opletajev)*
- 21 *Nova dumviva membro de REU kaj aliĝoj por 2014*
- 21 *Venu al “APER0-8” (I.Gonĉarova)*
- 22 *40-a FaRo (I.Gonĉarova)*
- 22 *UEA invitas prelegi en la Bonaera IKU-sesio*
- 22 *Partoprenu en la Belartaj Konkursoj de UEA*
- 23 *La 39-a Malferma Tago en vigla etoso*
- 23 *Du filmoj aldoniĝis al la Reta Kinejo*
- 24 *Helmar Frank forpasis*
- 25 *Kotizregularo de REU por la jaro 2014*
- 26 *Malfermo de MEB-MASI (I.Gonĉarova)*
- 27 *Nova redaktoro Fabrício Valle invitas al kuna kreado de “Esperanto”*
- 28 *La Odo al Samarkando tradukita al 62 lingvoj*
- 30 *Forpasis Lena Karpunina*
- 31 *Novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ*
- 32 *Greziljono invitas al PRINTEMPaS*
- 32 *Amuzaj misskriboj kaj eraroj*
- k3 *Lingvaj Festivaloj en Ĉeboksari kaj Moskvo*
- k4 *Zamenhof-tagoj en Moskvo kaj Jekaterinburg*



**Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj!
Ne forgesu (re)aboni REGon!**

REGo **(Rusia Esperanto-Gazeto)**

№ 6 (79) decembro 2013
aperadas ekde 2000

redaktas Georgij Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio

retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2014:

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj
de KŜŜ – 580 rubloj, sendantaj al:*
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo “Яндекс.Деньги”

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj
*pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*
elektronika abono – 300 rub. (10 eŭr.)

Informletero 1

Karaj geamikoj! Ni ĝoje invitas vin al la deka, jubilea ural-siberia printempa regiona E-renkontiĝo EsPrimo, kiu okazos la 1-an – 3-an de majo 2014 en Jekaterinburg! Iniciatintoj kaj organizantoj de la renkontiĝo estas jekaterinburga esperantista klubo “Arĝenta flamo” kaj kelkaj regionaj aktivuloj. Esperantistoj ekaktivis en uralaj urboj en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento. Dum tiuj preskaŭ cent jaroj la esperantista movado en Uralo spertis progresojn kaj elanojn, suferis pro persekutoj kaj reprezalioj, impete renaskiĝis dank’ al senlaca agado de elstaraj esperantistoj. En pli ol deko da urboj de Uralo nun vivas esperantistoj kaj funkcias esperantistaj kolektivoj. La E-klubo “Arĝenta flamo” estis fondita en junio 2007, ĝi unuigas agemajn membrojn, kiuj ne nur aktivis en la urba skalo, sed ankaŭ per siaj iniciatoj efike akcelas la tutregionan agadon.

Esperanto estas lingvo servanta por interkulturaj utiligoj, kaj esperantistoj kiel aktivaj kulturagantoj peras kaj kultivas ne nur nacian kaj internacian kulturojn, sed ankaŭ reciproke evoluigas sin konsumante kulturajn valorojn pere de Esperanto, uzante ĝin en diversaj sferoj de la homa vivo. La temo de la jubilea EsPrimo “**Kreante, verkante, legante**” koncernas la lingvokulturan aplikadon de Esperanto en diversaj formoj de individuaj kaj publikaj manifestiĝoj. Esperantistoj estas homoj kreemaj. Tial ni, la organizantoj, esperas, ke la elektita por la renkontiĝo temo estos loga kaj plaĉa al tiuj, kiuj celas stimuli kaj plivigligi sian kreaĵon per Esperanto. Do ĉiu partoprenanto estu preta oferti al la kultura programo sian originalaneron elektante el sia propra krea bagaĝo aŭ el la varia temaro sugestata de la Organiza teamo.

Organiza teamo

1. Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg), kunordiganto de REU en Uralo – ĝenerala kunordigado;
2. Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg) – informado, kontaktoj kun la bazejo de EsPrimo-10;
3. Aleksander Osincev (Jekaterinburg) – kultura, lingva programoj;
4. Arina Osipova (Jekaterinburg) – kultura programo, interrilatoj kun eksterlandaj esperantistoj;
5. Jana Husanova (Jekaterinburg) – kultura, turisma programoj;
6. Vladimir Opletajev (Surgut) – lingva, eduka programoj;
7. Pavel Veselov (Tjumenj) – komputila servo, retligoj (Ural-Siberia paĝaro).



Aliĝkotoj: antaŭ 15.03.2014 – 400 rubloj, antaŭ 15.04.2014 – 500 rubloj, ekde 16.04.2014 kaj surloke – 650 rubloj. Rabatoj por pensiuloj kaj studentoj – 100 rubloj. Infanoj ĝis 14-jaraj – senpage.

Pagmanieroj por aliĝkotoj

Per ordinara poŝto: Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041, Екатеринбург, аб.ящ. 132

Яндекс-деньги: 41001200112112 (kudry-viktor@yandex.ru)

Webmoney: R196135669751 (rubla); Z290685360282 (dolara)

Loĝkondiĉoj kaj prezoj

EsPrimo-10 okazos surbaze de sufiĉe komfortkondiĉa kuraca ripozejo “Uktus”, kiu situas en la urbo mem.

Variantoj de loĝado:

1) en 2-ĉambraj luksaj apartamentoj kun duŝejo kaj necesejo – 1200 rubloj por unu diurno;

2) en dultaj ĉambroj, kie du ĉambroj havas komunan ban- kaj necesejan ekipon – 600 rubloj por unu diurno.

Trifoja manĝado por unu tago – 500 rubloj. Eblas mendi aparte: matenmanĝon – 130 rubloj; tagmanĝon – 220 rubloj; vespermanĝon – 150 rubloj.

En la programo: malferma kaj ferma ceremonioj, konferenco de legantoj, literatura konkurso, deklamkonkurso, lingva programo “Peĉakuĉo”, diversaj metiejoj, lingvaj ludoj, amika vespero, vespero “En la sfero de artoj”, jarkunveno de uralaj esperantistoj, ekskursoj.

Turisma programo

Jekaterinburg, fondita en 1723, estas la ĉefurbo de Urala federacia arondismento kaj unu el la plej gravaj industriaj, kulturaj, sciencaj, trafikaj kaj loĝistikaj centroj de Rusio. Al scivolemaj gastoj ĝi disponigas multajn interesajn kaj unikajn historiajn, kulturklerigajn kaj distrajn kampojn. Vi povos partopreni en busa ekskurso tra la urbo, eksterurbaj ekskursoj laŭ via plaĉo kaj viziti tute apude situantan akvoparkon. *Ni renkontiĝu en Jekaterinburg! Bonvenon!*

Kontaktoj

Ĝenerala retadreso <esprimo@ural-sib.org>

Raja Kudrjavceva <esprimo-10@yandex.ru>, +7 922 2982021

Viktor Kudrjavcev <kudry-viktor@yandex.ru>, +7 912 0342075

Aleksander

Osincev

<alex.osintsev@gmail.com>,

+7 902 2603613

Vladimir Opletajev <surborde@mail.ru>

Detalojn pri la aliĝado al la renkontiĝo, kromaj pagmanieroj kaj multajn aliajn informojn vidu ekde januaro 2014 en la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado” <www.ural-sib.org>.



LITERATURA KONKURSO

La Organiza teamo de EsPrimo-10, agnoskante la valorojn de kulturkleriga kaj lingva memevoluo de esperantistoj kaj konsiderante la kulturkampan temon de la renkontiĝo “Kreante, verkante, legante”, anoncas konkurson de literaturaj verkoj pri la temo “Mi vidas la mondon...”

Celo de la konkurso: Aktivigi kreaĵojn kaj beletrajn kapablojn de esperantistoj de Uralo kaj Okcidenta Siberio per verkado de diversgenraj mallongaj literaturaj verkoj.

Temo de la konkurso “Mi vidas la mondon...”

Aŭtoroj prezentu siajn proprajn perceptojn de la vivaj kolizioj kaj de la ĉirkaŭa mondo en kiu estas loko por amo kaj amikeco, primavero kaj Esperanto, beleco de la naturo kaj variaj homaj sentoj. Por la konkurso estas akceptataj originalaj, neniam publikigitaj verkoj (ne tradukoj) de plej diversaj ĝenroj: rakonto, eseo, raportaĵo (ne pli ol 3 paĝoj, formato A4), versaĵo, kanta teksto, skeĉo, teatraĵeto, humuraĵo, fabelo, fablo, anekdoto, ŝerco ktp.

Partoprenantoj

En la konkurso rajtas partopreni esperantistoj loĝantaj en Ural-Siberia regiono kaj partoprenantoj de EsPrimo-10 el aliaj lokoj per prezento de unu ĝis tri verkoj. La konkursaĵoj (tiparo Times New Roman, granda 14) estos sendendaj al Vladimir Opletajev <surborde@mail.ru> ĝis la 15-a de aprilo 2014. Sur la titolpaĝo la aŭtoro indiku sian personan nomon, familian nomon, profesion, aĝon, loĝlokon, jaron de esperantistiĝo.

Gratifikado de la konkursantoj okazos dum EsPrimo-10 en Jekaterinburg. Gajninto de la unua loko ricevos abonon por la revuo “Esperanto”, kotizante rabaton kaj diplomon; gajnintoj de la dua kaj tria loko ricevos libropremiojn, kotizante rabatojn kaj diplomojn de la Organiza teamo de EsPrimo-10. Iliaj konkursaĵoj estos publikigitaj en la Ural-Siberia retpaĝaro.

Konkursaj ĵurio

La Organiza teamo elektas tripersonan ĵurion el inter lingve kaj fake spertaj esperantistoj de Rusio. La ĵurio faros sian decidon ĝis la 1-a de majo 2014.

Kriterioj por prijuĝi la konkursaĵojn

La konkursaĵo devas havi titolon kaj konformi al la temo, esenco kaj enhavo de la konkursa problemaro.

Aktualeco, originaleco de la aŭtoraj ideoj, pensoj, emocioj kaj lingva perfekteco estu gravaj kondiĉoj karakterizantaj konkursajn verkojn.

Organiza teamo de EsPrimo-10

DEKLAMKONKURSO

La Organiza teamo de EsPrimo-10, agnoskante la valorojn de kulturkleriga kaj lingva memevoluo de esperantistoj kaj konsiderante la kulturkampan temon de la renkontiĝo “Kreante, verkante, legante”, anoncas deklamkonkurson pri la temo “Jen rideto de l’ printempo”.

Celo de la konkurso: stimuli la deklamarton de ural-siberiaj esperantistoj, plifirmigi ilian interesiĝon pri poeziaj artoj kaj lingvo.

Temo de la konkurso “Jen rideto de l’ printempo”

Viviga printempa humoro, amo, entuziasmo kaj ĝojo pri la vivo, beleco de la ekstera mondo malavare dorlotanta nin – jen estas temoj, kiuj povus emocii deklamantojn. Sed ni ne forgesu ankaŭ Esperanton, kiu beligas nian vivon kaj puŝas nin al plia memidentigo.

Por la konkurso estos elektendaj originale verkitaj kaj tradukitaj versaĵoj de rusiaj kaj eksterlandaj poetoj.

Loko kaj dato de la konkurso

Partopreno en la konkurso estas ĉeesta. Ĝi okazos en Jekaterinburg dum Es-Primo-10.

Partoprenantoj

En la konkurso rajtas partopreni esperantistoj de ĉiuj aĝoj per prezento de unu parkera recitaĵo. Deklamontoj bonvolu anticipi anonciĝi ĉe la Organiza teamo (Raja Kudrjavceva, <esprimo-10@yandex.ru>) sendante al ĝi jenajn informojn ĝis la 15-a de aprilo 2014: persona nomo, familia nomo, aĝo, loĝloko, profesio, jaro de esperantistiĝo, la aŭtoro de la deklamota versaĵo, titolo de la verko.

Laŭreato kaj gajnintoj de la dua kaj tria lokoj ricevos libropremiojn, kotizajn rabatojn kaj diplomojn de la Organiza teamo de EsPrimo-10.

Konkursaj ĵurioj

La organizantoj de la renkontiĝo elektas tripersonan ĵurion el inter lingve kaj fake spertaj esperantistoj el Ural-Siberia regiono.

Kriterioj por prijuĝi la deklamarton de konkursantoj (maksimuma poento por ĉiu aparta ero – 5)

1. **Paroletiketo:** salutoj kaj alparoloj, gestoj, dankesprimoj ktp., sinprezento kaj prezento de la recitata poemo kaj de ĝia aŭtoro.
2. **Tono de la recitado:** emfaza, konvinka, estetika.
3. **Prononco:** obeo al la bazaj normaj reguloj de la Esperanta prononco, elimino de rusaj akĉentaj specifaĵoj.
4. **Aktora arto:** arto sin teni komforte kaj senĝene antaŭ la publiko.

Organiza teamo de EsPrimo-10

METIUMU EN TEMoj

La kalendaro de esperantistaj aranĝoj por la somero-2014 proponas al ĉiu ŝatanto de etosumo en la lingva medio vastajn eblojn por elekto. Trastudinte tiujn eblecojn, multaj anoj de Tihvina Esperanto-klubo grandparte perdis sian antaŭan entuziasmon.

Efektive: kial ni, trankvilaj, nehastemaj provin-canoj interveni la konkurencon pri var-bado de partoprenan-toj, se ekzistas multe pli facila vojo: kun-meti la valizon kaj senprobleme ĝui la



Esperantan etoson en amasa aranĝo, organizata de aliaj? Des pli, ke kvanto de E-aktivuloj en Tiĥvin ŝrumpis, do ĉiu el la restintaj ricevus pli grandan pecon de prepara laboro ĉe organizo de amasa aranĝo.

Aliflanke, la unuaj Tiĥvinaj Esperantistaj Metiejoj (TEMoj), okazintaj en 2009, estis ĝuindaj kaj sukcesaj. Tiam ni eĉ promesis al niaj karaj gastoj, ke TEMoj iĝos neofta, sed tradicia aranĝo, organizota ĉiun kvinan jaron. Nu, kiel la Olimpikoj, proksimume... Ĝuste tiu kvina estos la 2014-a, kaj jam ekde la nuna somero venadis demandoj, ĉu ni emas plenumi nian promeson. Kion do ni faru?

Kun tiaj pensoj ni kunvenis en la klubo septembre post somera ripozo, kaj la pensoj provokis diskuton, pli ol horlongan. Post la diskuto okazis voĉdonado, kaj la plimulto el la kunvenintoj decidis: TEMoj okazu. Spite al ĉiuj kaj ĉiaj obstakloj.

Aŭspiciataj de REU, kun afabla helpo de Garik Kokolija kaj Maksim Grišin, ni produktis imponan reklamilon, kiun fakte oni nomu tradicie “La unua informilo”. La informilo estis dissendita al ĉiuj abonantoj de REGo, bonokaze disdonita en Esperanto-kluboj de

Vilno kaj Rigo, ekspedita al niaj Esperantaj amikoj en la ĝemelurboj de Tiĥvin, rete sendita al multaj E-grupoj kaj kluboj. Ĝin ricevas ankaŭ ĉiu partoprenonto de la Internacia Festivalo en Bavario. Sed la homoj komencis aliĝi eĉ antaŭ ricevo de la informilo. Laŭ la stato



por la 1-a de decembro 2013 ni havas 32 aliĝintojn el 3 landoj. Se adicii tiĥvinanojn kaj peterburganojn, kiuj, certe, ne preterlasos la okazon veni, ni jam povas diri: TEMoj okazos. Esperante tamen pri pliaj aliĝintoj...

La lokon, kie okazos TEMoj, bone konas multaj rusiaj esperantistoj, ĉar amasaj Esperanto-aranĝoj okazis tie jam kelkfoje: OkSEJT en 1999, REK-EOLA en 2007 kaj TEMoj en 2009. Estas bazejo por paralimpikaj sportistoj en apudurba vilaĝo Caricino Ozero (Carina Lago). La nomo garantias belan lagon apude, pinarbaron ĉirkaŭe, sed la carinon – ne plu.

La temaro de TEMoj ĉi-foje estos pli impona ol en la antaŭa aranĝo. La listo de aliĝintoj jam garantias bonkvalitan trinivelan Lingvan Metiejon, eĉ pli bonkvalitan Lingvofestivalan metiejon, Tradukistan, Poezian, Sportan, Kantan, Peĉakuĉan... La Vivo-metiejo prezentos tre interesajn personojn. Espereble, venos proponoj pri pliaj metiejoj. Ĉiuvespera koncerta programo promesas esti ĝuinda; inter la artistoj aliĝintaj estas ankaŭ Natalia Berce – ĉu ne en 1991 ŝi lastfoje koncertis en Rusio?! Certe, okazos ankaŭ vizitindaj ekskursoj – al la monaĥejo kun la famega Miraklofara ikono de la Tiĥvina Dipatrino, al la muzeo de Nikolaj Rimskij-Korsakov, al du



belegaj monaĥejoj, iom distancigitaj de la urbo. Se estos sufiĉa kvanto da dezirantoj, ni organizos ankaŭ tuttagajn ekskursojn – al Velikij Novgorod kaj al Vologda. Pri la surprizoj, kiuj atendas la TEManojn, ne endas paroli antaŭe – estos ankaŭ tiuj.

Certe, ne ĉio glatas dum la prepara laboro. Evidentiĝis, ke la kartnumero por sendi monon, anoncita en la Informilo, estas maltaŭga. La

fakto estas malagrabla, sed ne tro zorgigas nin, la organizantojn, ĉar la mono estos bezonata en aprilo 2014. Ĝis tiu tempo la problemoj pri pagoj estos solvita.

La retejo de TEMoj jam ekfunkciis ĉe la adreso <<http://notlibro.info/>>. Tie aperadas aktualaj informoj, funkcias listo de aliĝintoj, konstante ĝisdatigata, kaj la aliĝilo, ebliganta retaliĝon.

Dezirante feliĉan Novan jaron al ĉiuj legantoj de REGo, la loka organiza TEM-teamo konfirmas: ni laboros plenforte por ke ankaŭ TEMoj iĝu memorinda travivaĵo en la feliĉa jaro de ĉiu partoprenonto.

komisiito de la TEM-teamo, Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin)

“AŬTUNA KUKO” NOVEMBRE EN JEKATERINBURG

Ĉi-jara aŭtuno inspiris nin organizi ankoraŭ unu aŭtunan renkontiĝon, krom jam tradicia septembra, kiu kutime okazas en Jekaterinburg.

Ni komencis ĝin plani ankoraŭ oktobre kaj eĉ volis nomi ĝin “Aŭtuna inspiro”. Sed kiam ni estis preskaŭ pretaj anonci pri ĝi kaj inviti ĉiujn dezirantojn ĝin partopreni, ie en la reto aperis informo pri “Aŭtuna inspiro” – la aranĝo preparata de moskva esperantista teamo. Kompreneble, por ne ripetigi, ni tuj trovis la alian nomon por nia renkontiĝo: ĝi iĝis “Aŭtuna kuko”.

“Aŭtuna kuko” sukcese okazis en Jekaterinburg la 9-an de novembro kaj kunvenigis ĉirkaŭ 20 partoprenintojn. Krom jekaterinburgaj esperantistoj la renkontiĝon partoprenis ankaŭ du tĵumenanoj: Pavel Veselov kun sia frato Sergeo.

La organizantoj tre klopodis krei varman amikan etoson, detale pripensis kiel konvene aranĝi la spacon de nia renkontiĝejo: la venintojn renkon-



tis pendanta surmure speciala slogano:

“En malvarno kaj pluvo aŭtunaj
Vin varmigos amikaj brakumoj!”

Surtablaj ornamaĵoj ĝojigis la okulojn per la bunteco de la koloroj: specialaj tablotukoj kun kvazaŭ disĵetitaj aŭtunaj folioj – rufaj, flavaj, oraj; diverskoloraj kandeloj ktp. Ĉio servis por agordi la ĉeestintojn lirike kaj romantike... Ankaŭ la mallonga filmeto, dum kiu, akompane de bela muziko de “Aŭtuna valso”, surek-rane aperis ravaj aŭtunaj pejzaĝoj, kies beleco neniun povis lasi indiferenta.

La programo komenciĝis de ŝerca amika diskuto inter Arina Osipova, kiu ŝatas aŭtunon kaj ĝuas ĝin, kaj Aleksandr Osincev, kiu, milde dirante, preferas aliajn sezonojn de jaro, kiuj malpli deprimas kaj kutime pliĝojigas lin. Post tiu ŝerca dialogo estis intervjuitaj ankaŭ aliaj partoprenintoj, kiuj esprimis sian rilaton al aŭtuno, rakontis pri asocioj kaj emocioj, kiujn elvokas tiu sezono.

Poste estis bruligitaj la kandeloj kaj la programon daŭrigis alia duopo: Aleksandra Osipova, deklaminta Esperantan tradukon de priaŭtuna poemo de nia klasikulo A.S.Puŝkin, kaj Viktoro Kudrjavcev, prezentinta originalon de la sama poemo. Ankaŭ Jana Husanova deklamis tre belan poeziaĵon de M.Gišpling, ligitan kun aŭtuna temo, kaj Raja Kudrjavceva prezentis prozaĵon, kunhavantan kaŝitan intrigon: oni aŭdis kvazaŭ monologon de virino kun la sinceraj konfeso pri ties vivobservoj kaj preferoj, kaj nur fine eblis kompreni, ke tiu ĉi “virino” estas mem Aŭtuno. Kiel apartaj programeroj kaj dum la paŭzoj sonis pianaj muzikaĵoj, belege prezentitaj de Juliya Moĉalova. La programon tre agrabligis ankaŭ la gitarludo de Sergej Lokis.

Niaj fotistinoj, Juliya Degtjarjova kaj Katja Zamislova, preparis surprizon por la partoprenintoj, donacinte al ĉiuj memfaritajn bildkartojn kun aŭtunaj pejzaĝoj kaj subskribo en Esperanto. Dum la vespero ni interŝanĝis tiujn bildkartojn kaj dorse-flanke aldonis siajn bondezirojn al la amikoj.

Aparta fokuso en la programo estis dediĉita al la aŭtunaj naskiĝintoj, kiuj estis kelkaj, kaj ĉiuj ili ricevis tiuvespere agrablajn donacetojn kaj amikajn gratulojn. La tuta nia kompanio gaje tostis je ilia sano! Sur la festa tablo certe estis kaj tortoj, kaj kukoj. Sed la programo mem de tiu ĉi vespero estis granda “kuko”, kunbakita de ni ĉiuj.

Fine de la vespero ni plezure fotiĝis kune, kaj vi povas vidi kelkajn fotojn, kiuj reflektas apartajn momentojn de tiu ĉi agrabla evento.

***Raja Kudrjavceva,
kunordiganto de
REU en Uralo***



LA INTERNACIA LINGVA FESTIVALO EN ĈEBOKSARI

Kiu fremdan lingvon ne scipovas, pri la propra nenion scias

J.W. von Goethe, germana poeto

Ĉi-aŭtune jam la 18-an fojon okazis la Internacia Lingva Festivalo en Ĉeboksari, ĉiujara tradicia lingvo-kultura aranĝo, organizata de Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko kun subteno de la fremdlingva lernejo “Lingvoj por Sukceso” kaj aŭspicio de la respublika Ministerio pri edukado.

Kiel estas konate, la lingva festivalo celas montri lingvan variecon, unikecon kaj valoron de ĉiu lingvo de la mondo. Oni volas atentigi, ke la mondo estas multlingva kaj la homoj uzas efektive multe pli ol 5-10 lingvojn, do ĉi-jara festivala devizo “Por la lingva diverseco” bone esprimis la ideon.

Ĉi-jare la festivalo komenciĝis la 10-an de oktobro per la tiel nomataj “karaĵoj” – etaj kulturaj festivaloj kaj lingvaj konkursoj en mezlernejoj. Niaj fremdlandaj volontuloj kune kun la organizantoj de la festivalo vizitis lernejojn en



multaj distriktoj tra la respubliko kaj krome atingis la ĉefurbon de Maria Respubliko, Joŝkar-Ola, prezentante kulturojn kaj lingvojn de siaj landoj. La lernejoj ĝojis konatiĝi kun la eksterlandanoj kaj eksciis multon novan pri la albana, germana, slovaka, hispana, finna, itala, taĝika lingvoj kaj respektive pri la kulturoj.

La ĉefa festivala programo okazis la 19-an kaj 20-an de oktobro. Ĉi-jare ni revivigis la bonan tradicion de trilingva

prezento de gastoj kaj prelegantoj sur la scenejo – ĉuvaŝa, rusa kaj Esperanta – la tradicion, kiu estas tre grava por ni, ĉar ĝi montras la valoron de la internacia kaj la gepatraj lingvoj por sukcesa komunikado.

Honora gasto estis Rafael Mateos Gonzalez, hispana esperantisto kaj profesia instruisto de la angla, la hispana kaj Esperanto.

Entute en la festivalo estis prezentitaj 35 lingvoj: la araba, la bulgara, la vjetnama, la lingala, la kataluna, la laosa, la portugala, la latina, la litova, la samea kaj finna lingvoj, la antikva slava, la tatara, la taĝika, la sveda k.t.p. Krom tio estis kelkaj prelegoj, ekzemple: “Ekzotaj literaturoj kaj universalaj klavararanĝoj”, “Diru korekte, aŭ Gramatikaj nazioj”, “Lingva diverseco kaj personaj aŭ sociaj profitoj”, ĉiuj faritaj de Artjom Fedorinĉik el Ukrainio; “La rusa lingvo: de la fontoj ĝis la nuntempo” kaj “Perkomputila traktado de la rusa lingvo”, prezentitaj de Anna Vi-bornova el Moskvo. La Festivalo finiĝis per la jam tradicia internacia koncerto.

Tatjana Stepanova (Ĉeboksari)



NUR ALTEN!

Pli alten, pli alten, pli alten
Ni strebas al la verda stel',
Kaj flugos ni alten senhalte
Ĝis fina atingo de l' cel'.

El "Marŝo de MASI-anoj"

La 1-4-an de novembro apud
Moskvo okazis nova aranĝo de
Moskva Esperanto-Asocio
"MASI" sub la titolo "ALTE",

kio estas malĉifrata kiel Alternativa Lingva Trejnadon Esperanta. Ĝia ĉefa iniciatinto kaj organizanto estis Irina Gonĉarova (ĉiuj nomas ŝin ĉi tie Mirina).

Mi ĉiam miras, kie Irina prenas tiom da entuziasmo kaj energio por sia neelĉerebla agado: gvido de ĉiusemajnaj variaj lecionoj kaj aranĝoj por MASI-anoj, ĉiujaraj grandiozaj Lingvaj festivaloj en Moskvo, tradiciaj eksterurbaj kunvenoj "Strigo", "Apero" k.a. Kaj jen nun nova evento! Evidentiĝis, ke ALTE estas prova aranĝo por esplori kondiĉojn kaj metodojn por la sekvasomera internacia Somera Esperanto-Studado (SES-Rusio), kiu tradicie okazas en Slovakio kaj nun estas planata ankaŭ en Rusio.

La tasko estas grandega kaj gravega! Ĝi interesigis kaj entuziasmigis ankaŭ min, pro kio mi decidis partopreni en ALTE. Kaj mi diru tuje, ke mi ne bedaŭris pri mia decido. Malgraŭ tiu fakto, ke la aranĝo celis plibonigon de lingvoscioj kaj parolpraktikon de Esperanto por novaj esperantistoj, mi konstatas, ke ĝi estis utila ankaŭ por mi, havanta multjaran sperton en uzado de la lingvo.

Kio ravis min dekomence, estis la junaj partoprenantoj de ALTE. Tre ĉarmaj, kapablaj, saĝaj, disciplinmaj, multtalentaj, spritaj, gajaj... Tiun ĉi vicon de admiraj epitetoj eblas daŭrigi senĉese. Irina dank' al sia organiza kaj pedagogia talento sukcesis kolekti tiun ĉi brilan junularon, trovi por ili interesajn taskojn kaj variajn studformojn, entuziasmigi ilin. Eĉ la pseŭdonomoj de la ALTE-anoj, legeblaj sur ties brustŝildetoj, aldonadis malbanalan etoson. Jen estas Klera (Julija Samsonova). Kia trafa kromnomo! Ŝi efektive estas tre kompetenta pri Esperanto, flue parolas kaj dum la aranĝo eĉ instruis la lingvon (eksplikis la gramatikajn komplikajojn en Esperanto). Jen Lumanta (Jekaterina Ljubuŝina) – tre serioza kaj respondeca junulino, ne deziranta vane elspezi tempon por celoj ne ligitaj kun Esperanto. Fine de la aranĝo ŝi eldiris kritikon pri vakuaĵ – ĝis 20 minutoj! – tempopaŭzoj, kiujn necesus utiligi por studado de nia lingvo. Jen Digna (Nastja Goljc) – kombinis kaj seriozajn trajtojn de la karaktero (ŝi plenumis organizajn taskojn) kaj ĉarmecon de gaja aktoreco (kiel brile ŝi ludis en la improvizitaj skeĉoj!). Jen Dimbor (Dmitrij Borodajev) – sub la modesta sinteno malkovriĝas neordinaraj saĝo kaj kapabloj. Jen la ĵusaj finintoj de la baza kurso FaRo – Belfor (Dmitrij Bogatov) kaj Rivera (Tatjana Fjodorova) – modelo de studema fervoro (ankaŭ ili ne deziris pardoni la 20-minutajn paŭzojn en la programo!). Kaj ilia FaRo-samgrupanino Sindona (Irina Konopljanova) jam gvidis la Teatran trejnadon en Esperanto! Pri ĉiu el dudek

gestudentoj eblus verki apartan eseon. Ili ĉiuj estas unikaj kaj esperantemaj personoj, kiujn tre bezonas nia movado.

Dum la studsesioj mi ĝuis kreivan etoson. Studformoj ŝanĝiĝis post ĉiu horo, pro kio la studado estis interesa kaj tute ne laciga. Post lecionoj pri gramatiko de Esperanto (Klera) sekvis skriba tasko “Literatura portreto” (Mirina), kiam ĉiu verkis anoniman portreton de unu el la ĉeestantoj kaj ĉiuj aliaj devus poste diveni la objekton de la verko. Ekzercadon pri aŭdkompreno (Svetlana Smetanina) ŝanĝis teatrigita aranĝo “Juĝejo” (Digna), en kiu ĉiu studento improvize rolis anon de juĝ-proceso (juĝisto, advokato, prokuroro, plendanto, akuzato, atestantoj ktp). Fama Esperanto-poeto Oleg Ĉajka (Oĉjo) gvidis mallongan traduk-kurson kaj komunan kantadon kun sia gitar-akompano.

Post vespermanĝoj okazis artaj kaj popularigaj aranĝoj: du skeĉoj, kiujn reĝisoris Oĉjo (“Buntkokineto”) kaj mi (“Kiel maljunulo vendadis bovinon”); prezentado de slajd-filmetoj “Nebanalaj faktoj pri konataj landoj”, kaj en alia vespero – pri diversaj sciencaj temoj (inter la partoprenantoj estis kelkaj junaj sciencistoj).



Gravas rimarki, ke en ĉiuj programeroj aktive partoprenis ĉiuj ALTE-anoj kaj ĉio pasis nur en Esperanto. Esperante oni parolis ankaŭ en manĝejoj kaj en koridoroj, la rusa lingvo ne aŭdiĝis. Do, metodika aspekto de la aranĝo estis modela.

Ankaŭ la vivkondiĉoj estis tute taŭgaj: oportunas kombino de loĝ- kaj studĉambroj, manĝejoj kaj baseno kun saŭno en la sama konstruaĵo, bonas apartaj ĉambroj por 2-3 personoj kun duŝejoj kaj necesejoj. Kio koncernas manĝofertojn, ni preferus pagi iom pli, sed havi la “svedan tablon” – por ĉies gustoj: la kuirkondiĉoj ĉi tie ebligas ĉion! Ŝajnas, ke la sola ĝena malavantaĝo estas ke en la konstruejo abundas fremdaj ripozantoj, sed estas kredeble, ke por SES-Rusio ankaŭ tion la organizantoj solvos.

Mi alvokas la rusiajn esperantistojn aktive subteni la unikan en nia lando internacian aranĝon SES-Rusio – unuavice per alveno kaj venigo de neesperantistoj-interesiĝantoj, komencantoj, inertaj samklubanoj! Per niaj komunaj penoj la internacia aranĝo estu plensukcesa kaj alportu prestiĝon al la rusia Esperanto-movado!

Ludmila Novikova (Moskvo)

Impresoj de Norden (Aleksandr Lebedev)

Entute al mi tre plaĉis la aranĝo.

Mi atendis de ALTE lingvan praktikon. Kaj ricevis ĝin. Tio estas la unua okazo, kiam mi devis paroli nur Esperante dum tri tagoj. Estis nekutime. Sed agrablas, ke kompare kun la tempo antaŭ duonjaro mi povas konkludi, ke ĝenerale mi komprenis preskaŭ ĉion, almenaŭ kiam ne distrigiĝis. Kaj, espereble, tiuj ĉi tri tagoj ankoraŭ iom plibonigis mian parolan lingvon.

Malfacilas diri, kiujn el programeroj mi pli ŝatas. Grava, utila, tute konvena al la aranĝo estis la programero “Aŭdkompreno”. Sed ĝi evidentiĝis facila, kaj divido en du partojn por niveloj B kaj C laŭ mi estis superflua. Estus bone, se ĉiuj provus inkluzive C1. Tre plaĉis al mi “frazecologiaĵoj” fare de Oĉjo. Kaj tre mankas al mi tia programero, kiel “Interpretistoj”, kiuj estis en “VsPlesk”. Aŭ kiel io simila en dialoga formo, kio estis dum unu leciono de nia prepara kurso por KER-ekzameno. Teatraĵoj kaj aliaj distraj aferoj, certe, bonas, sed ili ne estas ĉefaj por trejnada aranĝo, kaj, ŝajnas, konsumis iom multe da tempo. “Nepeĉakuĉo” estis originalaĵo de ALTE kaj por la unua fojo tute sukcesis. Do, el ĉiuj prezentadoj al mi plaĉis tiuj, kiuj estis plej kurtaj kaj proksimaj al peĉakuĉo. Sed, ĝenerale, la ideo pri kurtaj prezentadoj el simplaj bildoj estas bonega. Ankoraŭ memorfiksiĝis al mi la literaturumado pri konataj historioj en neordinara stilo kaj la literaturaj portretoj. Ambaŭ programeroj estis interesaj. Gemuta kaj ĉarma ekstertagorda gufado okazis en la ĉambro de Oĉjo. Dankon pro kantoj kaj teo!

Do, tiuj ALTE-tagaj estis fruktodonegaj kaj saturitaj de impresoj. Indas ripeti ilin iam en estonteco.

Impresoj de Sindona (Irina Konopljanova)

ALTE estis por mi admirinda festo, kiu konsistis el diversaj ĝuoj. La unua estis ĝuo de komunikiĝo kun talentaj, saĝaj kaj erudiciaj homoj. La dua – plezuro de konatiĝo kun novaj scioj en interesa, viva formo. La tria – multe da pozitivaj emocioj de trejnadaj, teatraĵoj, ludoj. La kvara estis amika subteno, ĉar en la lingvo mi estas komencanta parolanto.

Grandegan plezuron mi ricevis de teatra trejnado, kiun mi faris unuafoje. Malgraŭ ke mia parolado estis stumbla kaj mallerta, ĉiuj partoprenantoj tiel rapide komprenis, kion ili devas fari, ke aperis sento, ke vortoj ne estis bezonataj. Ĉuj havis imagipovon, improvizopovon kaj prezentipovon. Admiro!

Mi deziras danki la organizantojn pro la ejo, pro la programo, pro la bonega kompanio, kaj pro infekto pri soifo de scioj kaj deziro partopreni en tiuj aranĝoj ankoraŭ kaj ankoraŭ.



PREFIKSE UZATAJ E-VORTOJ

parto 9¹

SUPER

Multaj homoj estis en stato de grava manko. Kaj rifuĝantoj **superfluis** la urbojn.

Joel Brozovsky, el la japana, Oomoto, 1992, p. 18

Por li evidentas, ke religio estas nure **superstrukturo**: iu ideologia produktaĵo amasiĝinta sur la veron kaj...

Zeechin Armando, or., Fonto, 253 (1, 2002), p. 12

SUPRE

... nome la artan sistemon – kie la praktiko de la homaro dum pluraj epokoj ne konas **suprenan** dinamikon.

Ignat Bociort, or., Rumanio, Simpozio, 19, p. 10

SUR

Hodiaŭ la negoca vivo devigas ŝin, vole nevole, elmeti siajn **surojn** al la rigardoj de la viraro...

Karl Schulze, el la germana, B.Brecht, Trigroŝa romano, Edition Leipzig, GDR, 1977, p. 318

Laŭ bildo 1, la sep plej grandaj pecoj trafis en oceanojn: Unu sudoriente de Aŭstralio: sur tiu kontinento oni trovas tektitojn. Tiuj estas ŝtonoj, kiuj estiĝas pro la varmego kaŭzita de la **surbato**.

Walter Klag, or., Germanio, Monato, 1993, p. 16

Je la malferma amasa marŝado proksimume kvardeko el ni iris kune portante rubandojn, flagojn kaj specialajn identigajn verdan **surĉemizojn**...

José Antonio Vergara, Ĉilio, Esperanto, 2003, 3, p. 56

... li sin vestigis en la amelumitan **surĉemizon** kaj veturis en la proksiman urbeton.

Viktor Gruško, el la rusa, Norda Prismo, 1964, 1, p. 12

Blondan knabeton, kiun ŝi dume gvidis emane, ŝi etendis alten al la konkeranto **surĉevala**, metas leve en liajn brakojn.

Rita Russler-Buckel, Germanio, La Gazeto, 82 (apr. 1999), p. 28

Mintrajna vagoneto kun tabulo, sur kiu **surestas** dulingva etbiografio (vidu la supran foton)...

Thomas Sandner, or., La Ondo de Esperanto, 2007, 8-9, p. 13

La popolo, la radiostacioj, la gazetoj solvas siajn vortarajn problemojn **surmamente**, dum la studadoj de la Akademio daŭras jarojn.

Carlo Minnaja, or., Italio, Literatura Foiro, 216 (aŭg. 2005), p. 182

Mi avertas vin, ke mi persone jam toleris sufiĉe. Mi sopiregas doni al vi **urnazon**.

Bertram Potts, or., Nov-Zelando, La Nova Butikisto de Nukugaia..., Stafeto, 1978, p. 102

¹ La antaŭaj partoj aperis en REGo №№ 3-4 (70-71) – 6 (73), 2012; 1 (74) – 5 (78), 2013.

Kiam iu etnolingvo estas tro malgranda por havi propran ŝtaton, ĝi akceptas la skribsistemon de ia **surordigita** ŝtato. La kreolan, ekzemple, oni povas skribi per la franca skribsistemo.

Eugene de Zilah, Hungario-Francio, La Gazeto, 102 (okt. 2002), p. 4

Preterirante la ruĝvizaĝan pentristinon de salikokoj li mamopinĉis ŝin kaj ricevis laŭtan **surorelon**.

Anatolo Gonĉarov, el la rusa, Literatura Foiro, 220 (apr. 2006), p. 96

Estas neimageble, ke li **surpafis** tiun malfeliĉan Pista Baltazar...

I.Nagy, el la hungara, Z.Moricz, Varmega kamparo, HEA, Budapest, 1985, p. 76

Por vi mi faris veluran jakon, kaj jen la ĉapo, kian **surportas** niaj laŭmoduloj; mi brodis ĝin por vi antaŭ longe. Ĉu vi volas ĝin **surprovi**?

J.Beau, el la franca, Prosper Mérimée, Colomba, The Esperanto publishing Co.L.T.D., Anglujo

Krome ni instruas al niaj almozuloj, lepromalsanuloj, senhejmuloj, **surstratuloj**, kio estas natura familia planado...

Probal Dasgupta, or., Hindio, Femina, 7, 2006, p. 6

Mi memoras la uzon de eksmodaj aviadiloj por eviti konfuzon kun tiuj venditaj al alia kampo, la **surtakson** de la iraka armeo, la paradoksan aserton pri rapida venko.

Christian Rivière, or., Francio, Fonto, 273 (sep. 2003), p. 15

Sur la tersurfaco videblas multe da krateroj. Tio pravas, ke tiaj elkosmaj **surtrafoj** ne estas maloftaj.

Walter Klag, or., Monato, 1993, 6, p. 17

Mi eltenadis ĝis la tago, kiam mi **survangis** mian mastron, kiu estis fortirinta min en kelangulon por pli senĝene min palpaĉi.

Simone Boniol, or., Fonto, 99, p.12

TRA

Fine la leganto fidu, ke la literatura valoro **trabrilas** ĉiun historian nebulon.

Tim Westover, or., Literatura Foiro, 224 (dec. 2006), p. 320

Poetaj paĝoj sciu sin kontenti.

Jam estas du aŭ tri pli ol sufiĉaj

por montri formon. Sed por **trajarcenti**

je sentoj kaj je pensoj estu riĉaj.

Nikolaj Lozgaĉev, or., Rusio, Literatura Foiro, 182 (dec.1999), p. 322

Ĉu la frato komprenis esperanton, aŭ ĉu la letero estis maniero de Ommie “**tra-verki**” siajn problemojn kaj atingi iun internan pacon pri okazintaĵoj.

Tim Westover, or., Literatura Foiro, 224 (dec. 2006), p. 321

Estis larmoj ĉie, sur la **trakuseno**, sur la ĉemizo, sur la rando de littuko...

Daniel Luez, el la franca, Fonto, 102, p. 30

Dum matenmanĝo li fotokopiis dokumentojn. Dum **tranokto**, li redaktis, printis,

dissendis en la reton ĉiutagan konferencan informilon.

Madeleine de Zilah, or., Francio, La Gazeto, 96 (okt. 2001), p. 7

Jen cinikulo kiu scias ridi pri tiu straba mondo! Mi **tranazis** ĉiujn liajn verkojn.

Cezaro Rosseti, or., Britio, KREDU min, sinjorino!, eld. Heroldo de Esperanto, 1949-50, p. 88

Due mi ŝatus atentigi pri kelkaj koboldoj kiuj **trapetolis** mian novelon “Dezerta dizerto”...

Gonçalo Neves, or., Portugalio, Monato, 1993, 10, p. 6

La fratinoj jam enlitiĝis, la avino senĉese **trapreĝas** la rozarion, la patrino ien turniĝas...

Marinko Givoje, el la kroata, Fonto, 63 (1, 1986), p. 21

Sabate ni **trapromenis** la urbon, detale studis frontoŝtonojn...

Ewont Lame, or., La Ondo de Esperanto, 2005, 2, p. 7

– Frapfrakasu lin, **trapugnu** la stomakon, bat-elŝutu la dentojn.

or., Jugoslavio, Tragedio en la Universo, Zagreb, 1961, p. 28

Li batalas por la reformado de la eklezio, por la adaptiĝo al la postuloj de la rapide ŝanĝiĝanta epoko **trasulkita** de markantaj ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj.

Jozefo Horvath, or., Hungario, Literatura Foiro, 223 (okt. 2006), p. 236

La novelo fascinas pro la akordo de juneco kaj matureco, kio **traserpentas** la unuopajn evolustadiojn de la agado.

Till Dahlenburg, or., Germanio, Literatura Foiro, 227 (jun. 2007), p. 146

“Kisu... ankoraŭ, ... ankoraŭ.” Kiam pli malvarmeta ondo de la vento ilin **travizitis**, ili observis, ke ili kuŝadas sur la verda herbaro, kaj ke tamen ne estas tiel malplena tiu mondo.

Gyula B. Bérzesssi, or., Hungario, Norda Prismo, 1970, 1, p. 47

TRANS

Vi ne havas tempon zorgi pri la pasinteco; kaj pri la estonteco vi ankaŭ ne pensis. Vi scias nur, ke homo devas esti boato en la longa rivero kaj povu alvizaĝi la nuntempan **transbordon**.

Zhang Xuesong, or., Ĉinio, Literatura Foiro, 201 (feb. 2003), p. 3

... sed tiu perdolisto ne povas postpravigi la kontraŭjure komencitan kaj krime kondukatan militon, kaj certe ne kompensi la **transgrandan** nombron de la mortintaj kaj kriplitaj virinoj kaj infanoj, kiu el okcidenta vidpunkto banaliĝas per la barbara perifrazo *flankaj damaĝoj*.

Literatura Foiro, 221 (jun. 2006), p. 127

Por **transponti** la problemon, li simple proponas majuskligi la “ĉapelitajn” literojn.

Heroldo de Esperanto, 1997, 2, p. 3

... transdonu al la junularoj en la urboj Hiroŝima kaj Nagasaki. Kaj **transdiru** al ili, ke en nia patrujo...

or., Jugoslavio, Tragedio en la Universo, Zagreb, 1961, p. 10

Male Manuel de Seabra venis al Barcelono, kie li vivas ekde 1954 kaj, lingva **transfuĝinto**, verkis tiun strangan “Conetxes Blaise Cendrars” kiun mi katalune legas.

Marie-Frane Borot, or., Literatura Foiro, 190 (apr. 2001), p. 63

Post nur dudek jaroj, la spertaj dezerto-militistoj, duonkaŝitaj interne de kirliĝantaj sabluraganoj, **transfuriozis** la limojn de siaj najbaroj.

Hugo Röllinger, or., Sennacieca Revuo, 1991 (112), p. 10

Kie vidiĝas, kiel en spegulo, la knabinoj mem, ĉiu el ili oferanta siajn vundojn, dolorojn, agoniojn; kaj ĉerpanta el la ofero dolĉan ĝojon **transtiman**.

Eugene de Zilah, or., Hungario – Francio, La Gazeto, 85 (dec. 1999), p. 25

Sekve oni trovis la solvon disdoni al la gajnintoj portretojn de Hajós kun lia programana subskribo: jen denove io same **transformale** alia ol doni ordenojn.

Lariko Golden (denaskulino), el la hungara, Esperanto, 1997, 12, p. 203

En oktobro tiu komisiono, en kiu ankaŭ mi membras, kunsidis kelkajn tagojn en Roterdamo por pridiskuti kandidatojn por diversaj postenoj kaj la aranĝojn faren-dajn por certigi **transponton** de la laboro de la malnova al nova stabanaro.

Humphrey Tonkin, or., Usono – Anglio, Esperanto, 2001, 11, p. 181

Sed se tio ne plaĉus al vi, vi simple rajtas **transdormi** la matenmanĝon, ellitiĝi tagmeze kaj ĝui la variajn programojn...

Szabo Tibor, or., Hungario, tejo tutmonde, 2002, 2, p. 17

Vi scias nur, ke homo devas esti boato en la longa rivero kaj povu alvizaĝi la nuntempan **transbordon**.

Zhang Xuesong, or., Ĉinio, Literatura Foiro, 201 (feb. 2003), p. 3

Tiun filon ni nomis Agbe. Onidire liaj agoj sendis la patron al la **transtombo**.

Gbeglo Koffi, or., Niĝerio, Literatura Foiro, 201 (feb. 2003), p. 31

Dum ni diligente esploras ankoraŭ da subvenciebloj, ni momente ĉefe per donacoj **transpontas** la malfacilan komencan stadion.

Jorg De Mulder, or., tejo tutmonde, 1996, 1, p. 9

Se eĉ pontolingvo, kies plej ofte laŭdita celo estas interkompreniĝo, ne povas **transponti** homajn korojn, tiam esperanto fariĝas por la vojaĝanto fonto de malespero.

Tim Westover, or., Literatura Foiro, 224 (dec. 2006), p. 324

TRO

Min estas nur parte kristana. Plene kristani estus superhome. Kaj oni diras, ke mi estas multe pli ... kiel diri? ... pike ĉarma dank’ al tiu mia **ne-tro-modesteco**.

Johán Valano, or., Svislando, Ĉu li bremsis sufiĉe?, Antverpeno, La Laguna TK-Stafeto, 1979, p. 40

Verkanto en esperanto frontas malan problemon: oni facile dronas en ĝia **flekseblecotroo**; fari la plej trafajn elektojn el tiu eblecosvarmo iĝas tre malfacila.

Giorgio Silfer, or., Italio – Svislando, Literatura Foiro, 127 (okt. 1990), p. 34

Limeriko
Suferis dikul' en Bordofo
pro daŭra dolora pirofo.
Doktoron konsultis,
sed tiu insultis:
“Nur kulpas porkaĵa **trodofo**!”
Monato, 1997, 4, p. 26

TUJ

La broŝuro entenas argumentojn postule al esperantmovada konsidero de la Nova HelpAlfabeto (NHA) por ke la skribita Esperanto trovu sian **tujeblian** aplikon en la ĝeneralaj amaskomunikiloj.

Till-Dietrich Dahlen-Burg, or., La Gazeto, 108 (okt. 2003), p. 22

La artisto Flers reprezentas ŝin sur flankmuro de domo, **tujproksime** al stratangulo.
István Ertl, or., Hungario, Fabienne Bertheldt, Literatura Foiro, 140 (dec. 1992), p. 287

Okazas foje ankaŭ eraroj neintencaj, sed kun same spektakla efiko. En novembro 1986 la Eŭropa Parlamento akceptis rezolucion por asigni 50 000 ekuojn por starigi “**tuj-brigadon**” (angle: flying squad) de fraŭd-kontrolistoj.
el la nederlanda, Esperanto, 1987, 2, p. 30-31

... kaj preparis por ili kafon el **tujpreparaĵo**.

Miyamoto Masao, or., Japanio, Naskitaj sur la ruino Okinava, Japanio, 1976, p. 132

Antaŭ mi **tujtago** vele
Uzas ventojn – pukto pinta
Dige inter tempajn marojn.

Ivan Naumov, or., Rusio, Scienco kaj Kulturo, 2000, 1, p. 30

... pri posedo de nur unu ĉifona vestaĵo kaj nasko de **tujmortontaj** beboj.
Green Will, or., Monato, 1991, 10, p. 13

Li estas **tujfara** homo.
A. Gončarov, or., Rusio

... tamen ĉion deklaritan el la balkona alto de nia provizora prezidanto... ĝi prirea-
gas ankaŭ per **tujpetardoj**, budapeŝte cinikaj ŝercoj.
István Ertl, or., Hungario, Monato, 1989, 12, p. 24

Kaj ne ĉiuj homoj estas same diligentaj, **tujrespondaj**.
Aldo de' Giorgi, or., Italio, Esperanto, 1997, 4, p. 71

Tre salutinda estas la **tujsekva** okpaĝa komentario, al kiu resendas steletoj de la teksto.

Edwin de Kock, or., Sud-Afriko, Norda Prismo, 1970, 1, p. 57

Unue nature pri la lingvo. La poeto **tuj posta** al Zamenhof, Grabowski, en “La tagiĝo” samentuziasmas pri nova erao...

Timothy Carr, or., Britio, Literatura Foiro, 127 (okt. 1990), p. 12



REMEMOROJ PRI LA SOMERA VOJAĜO

Al mi ŝajnas, ke vojaĝoj en Esperantujo estas la plej grava parto de vivo de preskaŭ ĉiu esperantisto. Kaj tute ne gravas, ĉu oni veturas proksimen aŭ malproksimen. Gravas, ke oni renkontos novajn kaj malnovajn amikojn, ĝuos belegajn vidindaĵojn, promenos laŭ novaj aŭ oldaj stratoj kaj perceptos la spiriton de la loko, kie loĝas la homoj, posedantaj la plej mirindan lingvon. Mi tre multe vojaĝis en mia vivo kaj devas konfesi, ke ĉiuj vizitoj al fremdaj lokoj estis neforgeseblaj. Mi instruas la anglan lingvon, kaj verŝajne tiu kialo vekis mian intereson al Britio. Do, mia edzo kaj mi decidis en la Somera Festivalo en Šallowford.

Verdire, tiu ĉi vojaĝo iĝis jam la tria rekontiĝo kun britaj esperantistoj. La unua okazis en 2007 (en Barlaston), kiam BBC filmis pri la internacia lingvo; la duan fojon ni sukcesis trafi la Jubilean Festivalon (50-jariĝon), kiu same okazis en Barlaston; kaj la lasta diferenciĝis de la antaŭaj, ĉar pasis en tute alia loko, preskaŭ izolita de la ekstera mondo. Mi ne povas diri, kiu el la tri estis la plej interesa kaj memorinda, ĉar ĉiuj fiksiĝis en mia memoro kiel memstaraj eventoj, brilaj kaj neripeteblaj. Tamen mi volus atentigi, ke la ekonomia krizo tuŝis la tutan Eŭropon, kaj Anglio ne estis escepto. Ĉiu nova vojaĝo kostis pli multe kaj daŭris pli kurte. Ankaŭ ni mem ŝanĝiĝis kaj akiris la sperton trovi novajn eblojn por fari la ferion ne tro multekosta.

Sendube, ni ne povis veturi nur por Esperanto-Festivalo. Britio estas sufiĉe antikva lando, kie abundas ja vidindaĵoj. Unue, ni pasigis kvin belajn tagojn en Kembriĝo (Cambridge), vizitante oldajn kolegiojn de la fama urbo kaj promenante en nekredeble belaj parkoj kun lagetoj kie abundas fiŝoj! Kaj la fiŝoj ne timas homojn, sed atendas manĝaĵon de ili! Kun kio oni povas kompari sidadon sur la benko, kie antaŭ kelkaj jarcentoj sidis la elstara Njuton aŭ Darwin? Kaj boatado laŭ la rivero Kam en platfunda boato donacis fantastecajn sentojn! Kaj maleblas ne admiri la majestajn katedralojn! Tamen Kembriĝo estas studenta urbo, kaj ĉiuj studentoj (kaj ne nur studentoj) biciklas tie de mateno ĝis vespero! Oni malpermesas al studentoj uzi aŭtojn en distanco ĝis dek kilometroj de la univesitataj kolegioj! El Kembriĝo ni veturis al Stoke-on-Trent, enhoteliĝis tie kaj dimanĉe ekskursis al najbara urbeto Stone (Ŝtono), malgranda kaj fabela, kie ni profundiĝis en la tre trankvilan atmosferon de brita antikveco. Ni ne povis eviti gustumadon de la angla kuirarto, mia edzo ĝuis la faman britan bieron en la taverno, kaj mi adoris desertojn.

Kaj finfine laŭ nia plano ni devis atingi Šallowford, pri kies ekzisto eĉ tre malmultaj taksistoj suspektis. Kiel mi menciis antaŭe, la loko estis izolita kaj atingebla per neniu ajn transporto krom takso! Meze de kamparo staras impona domo, en kiu estas hotelo por religiaj homoj! Sed preskaŭ ĉiuj britaj esperantistoj estas ateistoj! Tamen ili scipovas estimi la religiajn konvinkojn de aliuloj (kiuj dum tiuj kvin tagoj forestis en la hotelo). Ni povis trovi nur religian literaturon kaj vidi, ke ĉiu



ĉambro estis provizita per ĉio, kion oni bezonis por serioza preĝado.

La gastakcepto ŝajnis tre varma. Post la momento, kiam ni eniris la domon, tuj virino akompanis nin al la komforta komuna ĉambro kaj alportis teon kaj kukaĵojn. Ni estis la unuaj esperantistoj kiuj alvenis al Ŝallowford. Poste aperis la aliaj – Joyce Bunting kaj tre agrabla paro, kiu

staris ĉe la disvolviĝo de Esperanto-movado en Britio: Hilda Johnes kaj Celia Mackle. Posttagmeze ni ĉiuj renkontiĝis en la komuna ĉambro kaj oni dividis nin je du grupoj: progresintoj kaj progresantoj. Mi aliĝis al la unua, mia edzo Sergeo – al la dua. Kaj nia vivo en la Festivalo komenciĝis! Ni ne multis: al mi ŝajnas, entute partoprenis ne pli ol 18 personoj (malpli ol dum la antaŭaj aranĝoj). La kialoj estis diversaj: la loko estis pli malfacile atingebla, la prezoj por manĝado kaj hotelo plialtiĝis. Kaj kelkaj veturis al Islando kaj ne povis partopreni en ambaŭ eventoj. Bedaŭrinde, Wedgewood College (Veĝvud Kolegio), en kiu okazis kvindek antaŭaj festivaloj en Barlaston, estis okupita de krimuloj! Tamen la fama biblioteko de Butler ankoraŭ troviĝas en Esperanto-domo en Barlaston. Ĉi-foje la partoprenantoj de la Festivalo dediĉis unu tagon por vojaĝi al la fama biblioteko de Butler kaj Esperanto-domo. Ni veturis tien per la propraj aŭtoj de lokaj esperantistoj.

La Festivalo ne multnombris, tamen ĉiu partoprenanto estis unika laŭ sia propra maniero. Krome, la Festivalo iĝis iugrade internacia. El Usono venis Erin Piatetski, kiu estas respondeca pri la interreta paĝaro “lernu.net”. En Ŝallowford ŝi gvidis la kurson por progresintoj. Ni okupiĝis pri multaj interesaj: analizis tekstojn, poemaron (ekzemple de William Auld), tuŝis la problemojn de esperantologio, Esperanta literaturo, eĉ faris gramatikajn ekzercojn en la formo “trovu la eraron”. Dum la lecionoj ankaŭ viglis komunikado kaj diskutado pri la propraj spertoj en Esperantujo. La dua grupo gvidata de Jack Warren (Voren) okupiĝis pri pli simplaj aferoj, tamen li klopodis fari la lecionojn allogaj kaj interesaj kaj dum ili oni povis montri siajn sciojn en diversaj sferoj. Ekzemple, Jack montris kelkajn fotojn de homoj konataj tamen ne tre famaj. Aŭ li montris bildojn de raraj bestoj aŭ fiŝoj ktp. Sergeo ĉiam “brilis” dum tiuj taskoj, kaj Jack Warren diris, ke rusoj estas tre erudiciaj homoj (li instruas la anglan lingvon por eksterlandanoj, ankaŭ rusoj). En tiu grupo ĉeestis geedzoj kiuj konatiĝis per Esperanto: Kamila (Pollando) kaj Arnold Pitt. Ili ne estas tre junaj, kaj antaŭ la geedziĝo ili ambaŭ estis vidvigiintaj.

Dum la tuta periodo de la Festivalo regis nur Esperanto, neniu alia lingvo! Ni ege ĝuis nian komunan manĝadon (cetere ĉiam bongustan kaj varian, eĉ neni

plado ripetiĝis dum tiuj kvin tagoj), teo- kaj kafo-paŭzojn, ĉar ni kolektiĝis kune kaj gaje babilis pri diversaj temoj.

Ĉiun vesperon kronis iu prelego aŭ prezentaĵo, kaj en la tago antaŭ la forveturo okazis distra vespero, kie ni, kiel infanoj, ludis diversajn ludojn, kaj preskaŭ ĉiu preparis propran skeĉon, deklamadon, kantadon. Jack eĉ ludis blovtubon. Ni multe distriĝis kaj ridis. Poste ni kunvenis en la kelo por trinki bieron, sukon, rusan vodkon. Ni regalis niajn amikojn ankaŭ per rusaj ĉokoladaj bombonoj kaj donis al ĉiu partopreninto memoraĵon el Niĵnij Tagil.

Post la Festivalo ni veturis al Londono, kie ni pasigis tri belegajn tagojn kaj poste adiaŭis la gastaman landon kaj forflugis al Jekaterinburg.

Lidija Jeroŝejeva (Niĵnij Tagil)

venu aprile al tbilisi

KarEsA (Kartvelia Esperanto-Asocio) invitas ĉiujn esperantistojn al la 7-a Mezorianta Esperanto-Kunveno, kiu okazos en Tbilisi de la 05-a ĝis la 10-a de aprilo 2014. En la programo de la renkontiĝo estas antaŭvidataj: prelegoj pri Rustaveli, la reĝino Tamara, historio kaj nuna stato de Esperanto en Kartvelio, ekskursoj tra Tbilisi kaj la antikva Mĉeta, Interkona kaj Adiaŭa vesperoj, Kartvela nacia art-programo. Estas planataj ankaŭ postrenkontiĝaj ekskursoj tra la lando. Dum la renkontiĝo okazos ankaŭ konkurso pri la elstara literatura verko – “Kavaliro en tigra felo” de Ŝota Rustaveli, kies Esperantan tradukon eblas legi ĉe <http://uea.org/vikio/index.php/KAVALIRO_EN_TIGRA_FELO>.

Ĉiujn bezonatajn informojn pri la aranĝo (kondiĉoj, prezoj, aliĝilo, programo, listo de la aliĝintoj) vi trovos ĉe <http://uea.org/vikio/index.php/la_sepa_mezorient_a_kunveno_en_kartvelujo_en_2014>. La organizantojn eblas kontakti per la adreso <mezorianta.kunveno@esperanto.org>.

Por la informo: Kartvelio (kartvele საქართველო /Sakartvelo/) estas lando en centra kaj okcidenta partoj de Kaŭkazo, historia heredanto de antikvaj ŝtatoj Iberio kaj Kolĥido (Kolĥeti), kaj hejmo de kartveloj. Ĝi estas membro de UNO, Konsilio de Eŭropo, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj. La lando havas 1461 kilometrojn da surteraj ŝtatlimoj – kun Armenio (164 km), Azerbajĝano (322 km), Rusio (723 km), Turkio (252 km). Cetere estas 310 kilometroj da ŝtatlimoj ĉe la Nigra Maro.

Ne preterlasu maloftan (nun) ŝancon viziti Kartvelion por partopreni en E-aranĝo.

Nana Ĥizambareli (Kartvelio)



Bulteno de REU

DECEMBRO 2013

N^o79. Kompilas kaj redaktas Nikolao Gudskov (rete: nikolao@yandex.ru),
redaktofino – 04.12.2013

REU SINCERE GRATULAS SIAJN ANOJN KAJ ĈIUJN ESPERANTISTOJN OKAZE DE ZAMENHOF-FESTO – TAGO DE ESPERANTA LITERATURO!

HISTORIO DE LA ZAMENHOF-FESTO

Ĉiujare meze de decembro (la 15-an de decembro 1859 naskiĝis la Majstro) en multaj urboj de la mondo estas okazigata Zamenhof-festo per kiu esperantistoj omaĝas al la kreinto de Esperanto kaj dediĉas sian atenton al la Esperanta literaturo. Tiu ĉi populara festo havas pli ol okdekjaran tradicion kaj estas nun integra parto de la tutjara esperantista kalendaro. Oni ŝuldas la aranĝon al la fama hungara verkisto, poeto, aktoro, instruisto Julio Baghy (1891-1967) pro lia iniciato akceptigi la ideon pri la Tago de la Esperanta literaturo.

En 1927 en la urbo Dancigo okazis la 19-a UK, kiu celebris la 40-jariĝon de Esperanto. Sur la urba Esperanto-placo estis plantita jubilea kverko. Julio Baghy pere de la hungara esperantisto Pál Balkányi proponis al la Kongreso, ke la 15-a de decembro estu la tago de la Esperanto-literaturo, kaj 905 kongrespartoprenantoj el 35 landoj unuanime aprobis la proponon. Jam decembre de la sama jaro en pluraj urboj okazis unuaj tiaspecaj festoj.

Plie la ideon de la decembra festo popularigis Izrael Lejzerowicz (1901-1944), kiu en la ĉapitro XII de sia fama satira verko “El la “Verda biblio”” (1935) admonis la esperantistaron celebri la Esperanto-libron. “1. En la dekkua monato de la jaro, en la dekkvina tago de tiu monato, festu la Feston de la libro. ... 3. Vespere kunvenu en viaj rondoj kaj grupoj, jubilu pro la potenco de nia verda afero. 4. Apogu viajn korojn per ĝojo kaj rido, kantoj kaj poemoj aŭdiĝu inter vi.”

Nuntempe inter la organizantoj de la Zamenhof-festo estas malgrandaj rondetoj kaj multpersonaj kluboj, fakaj grupoj kaj societoj, landaj asocioj kaj internaciaj organizaĵoj. Ankaŭ la programoj de la festo varias: en iuj urboj ili posedas jam tradiciigintajn erojn kaj intiman familian etoson, en la aliaj ilin distingas neordinaraj kaj tre modernaj trajtoj. Por multaj esperantistoj la festo gravas pro la eblo senpere manifesti sian esperantistecon kaj identigi sin kun la internacia kultura medio. Ĝi estas ankaŭ konvena preteksto por prezento (inkluzive la eksteran publikon) de la kulturaj valoroj generataj kaj perataj de la esperantista komunumo.

Vladimir Opletajev (Surgut)

NE FORGESU ALIĜI AL REU POR 2014!

Jen bona ekzemplo – kelkaj homoj jam aliĝis, pro kio la Estraro de REU ilin SINCERE DANKAS!

Nova Dumviva membro: *Vladimir Levadnij* (Sankt-Peterburg)

Kaj unuaj aliĝintoj por 2014:

Mecenato: *Anton Loŝmanov* (Komsomoljsk-na-Amure)

Individuaj membroj:

1. *Vjačeslav Ivanov* (Sankt-Peterburg)
2. *Boris Kondratjev* (Sankt-Peterburg)
3. *Jekaterina Maliŝeva* (Sankt-Peterburg)

Aliĝintaj kolektivoj:

Societo “Espero” (Sankt-Peterburg) – 11 membroj

Tjumenaj Esperanto-klubo “Revo” (Tjumenj) – 7 membroj

venu al “APER0-8”!

Karaj Esperanto-samideanoj! Moskva Esperanto-Asocio “MASI” kore invitas ĉiujn E-parolemulojn al sia tradicia renkontiĝo APERO-8! Ĝi pasos dum la februara festoj, 21-23.02.2013, en la apudmoskva bien-ripozejo “Jerŝovo”.

Kvankam la aranĝo estas strikte malkrokodila, ni kuraĝe invitas ankaŭ komencantojn kaj progresantojn, kiuj emas evoluigi sian E-paroladon kaj sekvi la Lingvan Disciplinon. Pli detale pri la invitatoj kaj kutimaĵoj eblas legi en la MASI-paĝaro <<http://ek-masi.weebly.com>> aŭ en la VKontakte-grupo “APER0” <http://vk.com/apero_ek_masi>.

Ni ĉiuj loĝos en la por multaj jam konata aparta dometo №5, kun granda salono, kie pasos la komunaj endomaj aranĝoj. Ĉar la dometo situas en pitoreska naturo kaj la ripozejo disponigas diversajn distraĵojn, ni multe amuziĝos ankaŭ eksternome. La plentempa partopreno kostas 3800 rublojn, kio inkluzivas loĝadon en 2-3-lokaj ĉambroj kun 2 tranoktoj, 3-fojan abundegan kaj varian manĝadon dumtage, aliĝ- kaj programkotizojn. Eblas veni tagon pli frue – necesas nur averti nin anticipe. Tiam al la prezo aldoniĝos 1500 rubloj. Se estos pli ol 10 personoj, masianoj volonte organizos programon ankaŭ por tiu kroma tago. Gravas konscii, ke en nia dometo estas 33 litoj. Do, ni ne povos akcepti pli ol 44 homojn. Tial por garantiite ricevi la kuŝlokon, bonvolu tuj mendi ĝin kaj prefere jam pagi al mi unu dekonon de la monsumo – 380 rublojn.

Ni ne toleros ajnan krokodiladon en la dometo, tamen, por ebligi partoprenon de familianoj, ni pretas lui kuŝlokojn en apuda dometo por esperantistoj, venontaj kun infanoj aŭ geedzoj, ne parolantaj Esperanton. La familianoj povos bonege ripozi, dum esperantistoj de la familio partoprenos la E-programon.

Ĉiuj kontribuoj al la programo estos arde akceptataj! Por aliĝi simple anoncu vin al mi – kaj ni kun ĉiu persone traktos detalojn.

Bonvenon!

Irina Gončarova, kunordiganto de MEA MASI, <mirinda.strigo@gmail.com>

Fine de novembro 2013 startis la vica FaRo (la baza E-kurso “Faru la Rondon”), gvidata de Irina Gončarova. Lernas 6 novuloj. Nenio speciala – rutina vivo de MASI. Krom la sola fakto, ke tiu ĉi FaRo havas la numeron 40. La 1-a FaRo okazis en la jaro 2002.

Irina Gončarova (Odincovo)

UEA INVITAS PRELEGI EN LA BONAERO IKU-SESIO

Dum la 99-a UK en Bonaero okazos la 65-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn pri prelegoj antaŭ 2014-01-31 al la sekretario de IKU (Prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo).

Lige kun IKU okazos studsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Aparte bonvenaj estas prelegoj lige kun la kongresa temo, “Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco”, sed same bonvenas ankaŭ prelegproponoj pri aliaj temoj. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto, kune ne pli ol unu paĝo.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita prelego estos rekompencita per honorario 260 eŭroj. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de UEA.

PARTOPRENU EN LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

La gvida Esperanta artkonkurso, la *Belartaj Konkursoj de UEA*, invitas partoprenantojn por la 65-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 99-a Universala Kongreso en Bonaero. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK, nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo.

Validas krome jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 × 65 karaktroj (kvin paĝoj).

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 × 65 karaktroj (dek paĝoj); la unua premio nomiĝas Luigi Minnaja.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2013. Unu premio.

Ĉiujn konkursaĵojn en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo oni sendu rete al <michela.lipari@tiscali.it>, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2014. En kazo de neeblo sendi rete, oni sendu unu paperan ekzem-

pleron al Belartaj Konkursoj de UEA, sekretario *Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italia*. Por la branĉo Infanlibro oni devas sendi tri ekzemplerojn de la koncerna libro al *Ionel Oneţ, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*, kun indiko “Por Belartaj Konkursoj”, kaj unu al la adreso de la sekretario.

Premioj: unua premio 260 eŭroj, dua premio 182 eŭroj, tria premio 104 eŭroj; Nova Talento 182 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 546 eŭroj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA kaj legeblas ankaŭ rete ĉe <www.uea.org>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

LA 39-A MALFERMA TAGO EN VIGLA ETOSO

Sesdek vizitantoj el naŭ landoj partoprenis la 39-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 30-an de novembro. La ĉefpreleganto estis d-ro Federico Gobbo, ekde februaro 2014 posteulo de Wim Jansen kiel estro de la kat-edro pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo.



Prof. Gobbo faris du prelegojn, kies temoj estis *Instrui interlingvistikon hodiaŭ: spertoj kaj konsideroj* kaj *Lingvoj planitaj por fikcio: kion ni povas lerni?* Ambaŭ prelegoj estis filmitaj por la Reta Kinejo de UEA. Al la programo kontribuis ankaŭ Ana Manero, kiu prezentis la Bitotekon de Hispana Esperanto-Federacio, kaj la TEJO-volontulo Roĉjo Huurman konatigis la aŭskultantojn kun la agado de la junulara sekcio de UEA. Ĉiuj pa-

roladoj elvokis viglan diskuton kun multaj demandoj kaj komentoj de la publiko.

En la programo estis ankaŭ filmoj kaj, kompreneble, funkciis la Libroservo, kies vendoj dum la tago sumiĝis je 1548,50 eŭroj. Plej multe furoris *Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school* (resuma raporto pri la projekto *Springboard to Languages*), la freŝa n-ro 18 de *Beletra Almanako*, la rakonto *Padma, la eta dancistino* de Tibor Sekelj kaj la fabelromano *Erik aŭ La malgranda insektolibro* de la nederlanda verkisto Godfried Bomans, kies 100-a naskiĝdatreveno estis festata ĉi-jare.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

DU FILMOJ ALDONIĜIS AL LA RETA KINEJO

Lastatempe du filmoj aldoniĝis al la Reta Kinejo de UEA. La unua estas registraĵo de la programero *La nova Estraro sin prezentas* en la 98-a Universala Kongreso en Rejkjaviko. Unue la Prezidanto Mark Fettes kaj la ses aliaj estraranoj prezentas sin, rakontante pri sia esperantistiĝo kaj antaŭa movada agado. En la dua parto la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer rakontas pri la novstila labormaniero de la Estraro kaj la Prezidanto Fettes skizas la ĉefan enhavon de la ĵus akceptita

Strategia Plano de UEA. La fino de la dua parto kaj la tuta tria parto konsistas el la demandoj de la publiko kaj la respondoj de la estraranoj.

La alia filmo, *La Zamenhofa revo*, estis registrita jam du jarojn pli frue: en la 96-a UK en Kopenhago en 2011. Temas pri la prelego de Davide Astori el Italio en la Internacia Kongresa Universitato. La plena titolo de la prelego estis *La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planizado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per Esperanto kaj homaranismo*. Ankaŭ tiu ĉi filmo estas dividita en tri partojn, kiuj daŭras po ĉ. 15 minutojn. La prelego mem konsistigas la unuan kaj la duan partojn, dum la tria parto enhavas la postan diskuton, en kiu unu el intervenantoj estis la intertempe forpasinta zamenhofologo Zofia Banet-Fornalowa.

Ambaŭ filmoj estis registritaj kaj redaktitaj de Francisco L. Veuthey.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

HELMAR FRANK FORPASIS

Prof. Helmar Gunter Frank, unu el la plej elstaraj pledantoj por la scienca apliko de la Internacia Lingvo dum la lastaj jardekoj, forpasis post longa malsano en la Zamenhof-tago, la 15-an de decembro. Li naskiĝis la 19-an de februaro 1933.

Helmar Frank doktoriĝis en 1958 ĉe la filozofo Max Bense. Frank fariĝis konata esploristo kaj aŭtoro pri kibernetiko, precipe pri ĝia apliko al estetiko, pedagogio kaj psikologio. En 1963 li fariĝis profesoro ĉe la kibernetika katedro de la Pedagogia Altlernejo de okcidenta Berlino. Ekde 1972 li laboris en la Universitato de Paderborn.

Frank lernis Esperanton en 1974 per kurso de Hermann Behrmann, kiu poste nomis lian varbiĝon “mia plej granda sukceso”. Frank malkovris la grandan potencialon de Esperanto por la sciencoj kaj la neceson de science pruvitaj argumentoj por la lingvo, kiun li mem preferis nomi ILo. Fine de la 1970-aj jaroj komenciĝis sub lia gvido internacia eksperimento pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, kies rezultoj estas ĝis nun ofte uzataj en la informado pri la lingvo.

La kulmina atingo de Frank estis la fondo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino en 1983, kiu celis fariĝi internacia universitato. Helmar Frank estis prezidanto de AIS ĝis decembro 2007. Rimarkinda fariĝis la aperigo de sciencaj verkoj fare de AIS, kutime en dulingvaj eldonoj (Esperanto kaj iu nacia lingvo). Ekde 1995 AIS kaj UEA kunlaboras per la okazigo de AIS-kursoj lige kun la Internacia Kongresa Universitato. Helmar Frank mem kontribuis al multaj sesioj de IKU kiel populara preleganto. Ekde 1974 ĝis 2006 li partoprenis ĉiujn UK-ojn, escepte de tri.

En 1974 Frank kunfondis Eŭropan Klubon, kiu celis antaŭenigi egalrajtecan lingvopolitikon en Eŭropo.



En 2013, okaze de la 80-a datreveno de Frank, aperis *Littera ScriptaManet, sarta in honorem Helmar Frank*, impona festlibro kun plurlingvaj eseoj de 60 amikoj liaj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

KOTIZREGULARO DE REU POR LA JARO 2014

(akceptita de la Estraro de REU per skriba voĉdono)

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto.

1. Individua kotizo – 250 rub. (por ekster-KŜŜ-anoj – 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (laŭpete REU sendas la materialojn ankaŭ per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj, abono de REGo kaj en REU-aranĝoj.

2. Dumviva kotizo – 20-oblo de la individua kotizo. La dumviva membro ricevas ĉion saman kiel la individua membro dum la tuta vivo.

3. Mecenata kotizo – ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. La mecenato ricevas ĉion saman kiel la individua membro plus dankan mencion en la Bulteno kaj en la asocia retejo <reu.ru>.

4. Kolektiva kotizo – 100 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). La aliĝinta kolektivo ricevas membrokartojn (elektronikforme) por siaj aligitaj membroj, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn, voĉdonrajton por siaj aligitaj membroj dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj, ĉe unu abono de REGo kaj en REU-aranĝoj.

5. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo – 300 rubloj, unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

6. Amiko de REU – senpage. Amikoj de REU ricevas rajton partopreni en REU-Konferenco sen voĉdonrajto, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Persono, sin anoncanta “amiko de REU”, devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian ekzistantan retadreson.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Krome, membroj de REU havas rabaton dum abono de REGo: por la individuaj membroj la abono por 2014 kostas 550 rub., por la aliĝintaj kolektivoj – 500 rub. (ne pli ol 1 ekzemplero).

La rublaj kotizoj sendendas al: *Шорохова Наталья Николаевна, до востребования, п/о Развилка, Ленинский р., Московская обл., 142717* (aliaj pagmanieroj vidu en <http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_eo.html>).

La eŭraj kotizoj sendendas al uea-konto “reua-p”.

Eksciu, ke...

MALFERMO DE MEB-MASI

La 12-an de oktobro okazis festo, dediĉita al la malfermo de la Moskva Esperanta Biblioteko de la Moskva Esperanta Asocio “MASI” (MEB MASI). Simila evento jam okazis, sed, bedaŭrinde, la unua hejmo de nia biblioteko en la Libera Spaco kun la poezieca nomo “Domo sub la arbo” ĉesis ekzisti. Ĉio – por plibono! Nun nia biblioteko lokiĝas en la fama per siaj avangardaj programoj moskva centro de junulara tempopasigo “Ĝeri Rubin” – kiu ekzistas jam 20 jarojn kaj ne intencas morti! Kaj en la Centro nia biblioteko ricevis la tutan apartan ĉambron.

La malfermo estis celebrita per distranĉo de la verda rubando antaŭ la biblioteka pordo. La feston partoprenis la lernantoj de E-kurso, funkciaĉanta ĉe la centro

“Ĝeri Rubin”, kiun gvidas Nikolaj Nikulin (Nikos) kaj Jekaterina Lozina (Miri), ankaŭ la kursanoj de FaRo-39, gvidata de Irina Gonĉarova (Mirina), MASI-anoj kaj aliaj interesiĝantoj. La organizantoj bone prepariĝis. Estis kreita speciala logotipo de MEB, faritaj glumarkoj kaj suveniraj notlibretoj kun ĝi, pri kio sindone zorgis Klera (Julija Samsonova).



La “lokanoj” (Miri kun la kursanoj) tre bone aranĝis la bibliotekan ĉambron kaj preparis la ejon, dispendiginte tra la tuta centro grandajn fotojn kun portretoj kaj citaĵoj de famaj verkistoj pri Esperanto. Dum paŭzoj eblis spekti E-filmetojn kaj aŭskulti kantojn en Esperanto. Mirina rakontis al la ĉeestantoj pri MASI-agado. Poste Klera gvidis la prezentadon de la libroj de “Sezonoj”, donacitaj al la biblioteko – kun projekciitaj ilustraĵoj kaj tekstofragmentoj, legataj de Nikos. Laste, sed ne balaste, okazis la preparita de Nikos kvizo “Vero-Falso” pri diversaj faktoj el E-historio kaj kulturo. Fine sonis Esperanta himno en speciala muzika interpreto de la gejunuloj el la E-kurso de la Centro. La etoso estis tre amika – neniuj emis disiĝi. La unua uzanto de nia MEB iĝis la lernanto de FaRo Belfor (Dmitrij Bogatov), kiu prenis unu el la romanoj de la fratoj Strugackij.

Ni deziras al MEB MASI multajn diligentajn kaj akuratajn legantojn! Kaj ni planas okazigi ĉi tie festojn, dediĉitajn al E-libroj, ĉiusezone. Bonvenon!

Irina Gonĉarova (Odincovo)

NOVA REDAKTORO FABRÍCIO VALLE INVITAS AL KUNA KREDO DE LA REVUO “ESPERANTO”

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo *Esperanto* havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabrício Valle estas elektita de la Estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014.

“Jam en sia skriba sinprezento, Fabrício Valle montris grandan energion kaj kreemon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro, – komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. – Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero.”

Valle estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro. Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficejo de Brazila Esperanto-Ligo (1996-2001) kaj prezidanto de la Federacia Konsilantaro de BEL (2001-04). Li ankaŭ fondis kaj gvidis propran eldon-entreprenon, *Zamenhof Editores*, de 1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provoj kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo *Intraespo*.

La redaktoraĵoj de Valle estas videblaj en la ok numeroj de *Brazila Esperantisto*, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Enkondukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave. Ankaŭ por la revuo *Esperanto* Valle antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu “transformiĝos en aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la movadaj organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranaj kaj komencantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantoj.”

La nova redaktoro verve laboras por lanĉi sian unuan numeron, tiun de januaro 2014. En ĝi apenaŭ plu restas spaco por pliaj eroj, sed des pli la redaktoro bonvenigas materialojn por postaj numeroj. Por gardi la freŝecon de la revua enhavo li emfazas, ke la novaĵoj, artikoloj kaj aliaj kontribuadoj estu novaj kaj ne jam aperintaj en retaj listoj aŭ aliaj gazetoj kaj forumoj. Oni prefere sendu la kontribuadojn retpoŝte al <redakcio@revuoesperanto.org>, sed, se necese, eblas sendi ilin ankaŭ paperpoŝte al: *Revuo "Esperanto", p/a Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Rua Faus-tolo 124, BR-05041-000 São Paulo, Brazilo*. La redaktoro bonvenigas ankaŭ proponojn pri artikoloj kaj ĉiajn komentojn pri la revuo.


Jam estas kreita speciala reta komunumo *Legantaro de la revuo "Esperanto"*, kie la nova redaktoro pretas rekte respondi demandojn kaj komentojn de siaj legantoj. Ĉiu, kiu volas aktive partopreni en la kreado de la revuo, povas aliĝi al la komunumo ĉe la adreso <<https://plus.google.com/u/0/communities/101994865936702585531?cfem=1>>.



Gazetaraj Komunikoj de UEA

la verda Koro

 kultura revuo



LA ODO AL SAMARKANDO TRADUKITA AL 62 LINGVOJ

Ĉe konata moskva eldonejo de la revuo “Junostj” (Juneco) aperis la nova libro de rusa poetino Irina Aleksejeva “Odo al Samarkando”. Ties oficiala prezento okazis la 17-an de oktobro 2013 en la Teatro de Historia Kostumo “El Merosi” en Samarkando, Uzbekio.

La poetino donacis sian poemon “Odo al Samarkando” al la Muzeo de Paco kaj Solidaro kiel kontribuon por ĝia internacia projekto “Samarkandiana”. Tiu ĉi poezia himno al la antikva urbo havas mirindan sorton: ĝi estas tradukita en multajn lingvojn. La libro entenas 71 tradukojn de “Odo al Samarkando” al 62 lingvoj (en 9 lingvoj estas po du versioj fare de

diversaj tradukintoj). La poemon tradukis 70 poetoj kaj verkistoj el 50 landoj.

Ĉi tiu unika antologio estas rezulto de preskaŭ trijara intensa laboro. La tradukojn kolektis kaj preparis por publikigo la redaktoro kaj kompilinto de la libro Anatoli Ionesov, la aŭtoro kaj kunordiganto de la projekto “Samarkandiana” kaj fondinto de Samarkanda Pacmuzeo (Uzbekio). Substrekindas, ke en tiu ĉi transkultura projekto la plej gravan rolon ludis la internacia lingvo Esperanto kiel efika lingvoperanto kaj siaspeca lingva ponto inter diversaj lingvoj kaj kulturoj. Ja, grandparte ĝuste dank’ al la Esperanta traduko de Vladimir Masalkin (Rusio) komenciĝis la vojaĝo de la “Odo” tra la mondo. Ne hazardas, ke inter la tradukintoj ĉirkaŭ trideko estas esperantistoj kaj la vortoj *Esperanto* kaj *esperantisto* aperas en la libro 81-foje. Apud diverslingvaj tradukoj de la poemo, la libro enhavas la enkondukan artikolon de Anatoli kaj Vladimir Ionesov “Samarkandiana: Kulturo Unuiganta la Mondon”, la eseon de Irina Aleksejeva “Mi kantas vin, ho, Samarkand!”, kurtajn biografiajn informojn kaj fotojn de la rusa poetino kaj de la tradukintoj, dank-paĝon, kelkajn enmetitajn kolorajn paĝojn kun bildoj pri “Romo de la Oriento”... Enestas ankaŭ mallonga resumo en la angla, germana, franca, itala, uzbeka kaj Esperanto.

La libroprezenta ceremonio komenciĝis per la enkonduka parolado de la prezidanto de la Samarkand-regiona filio de la Rusa Kultura Centro de Uzbekio s-ro Jurij Ognev, kiu invitis sur la teatron podion la moskvan gastinon. Irina Aleksejeva

varme gratulis la ĉeestantojn okaze de la Tago de la Urbo kaj rakontis pri tio, kiel naskiĝis la poemo “Odo al Samarkando”. Post ŝia deklamo de la Odo en la ruslingva originalo, sekvis elpaŝoj de lokaj poetoj, prezentintaj tradukojn de la poemo en kelkaj lingvoj, inkluzive Esperanton. La librolanĉan vesperon ornamis brila elpaŝo de la Samarkanda Teatro de Historia Kostumo “El Merosi” demonstrinta kelkajn fragmentojn de sia teatra-historia arta spektaklo “La Momentoj de Eterneco”.

Notindas, ke la libro, disponigata al la atento de leganto, prezentiĝas kiel transkultura kaj multlingva arta projekcio. La tradukado de la poemo en malsamajn lingvojn celis malkaŝi la neimiteblajn poeziajn nuancojn, akcentojn kaj intonaciojn de la sama teksto, sed en malsamaj lingvoj kaj kun malsamaj artaj opcioj. Tion eblas vidi praktike sur ĉiu paĝo de tiu ĉi neordinara eldonaĵo, kiu palpeble kontribuas al la Internacia Jardeko por la Proksimigo de Kulturoj (2013-2022), proklamita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

La novaperinta libro “Odo al Samarkando” eniris la Libron de Rekordoj de Rusio kiel “Poemo, tradukita al la plej granda nombro de lingvoj, publikigita en unu presita eldono”. Nun ni pensas pri ties eventuala daŭrigo kaj probable pri nova plenilustrita eldono kun pli da lingvaj versioj kaj pli da tradukoj. Tiusence la projekto ankoraŭ daŭras. Se vi volus kunlabori, anoncu vin ĉe imps86@yahoo.com.

Anatoli Ionesov (Uzbekio)



Ирина Алексеева (Москва, Россия)

Ода Самарканду

Пою тебя, о Самарканд!
Твой чудный облик восхваляю.
И твоё сердце – Регистан –
Я вечно юным называю.

Его биенье Улугбек
Предчувствовал под небом звёздным,
О, Самарканд! Твой долгий век
Величием Тимура создан!

Твои святые медресе –
Приют искусств и просвещения,
Они стоят во всей красе,
Столетия превратив в мгновенья.

Здесь Алишера Навои
Поэзию – любовь и силу –

Irina Aleksejeva (Moskvo, Rusio)

Odo al Samarkando

Mi kantas vin, ho, Samarkand’
Kaj laŭdas mi aspekton sunan!
Kaj vian koron – Registan’ –
Mi ĉiam pretas nomi juna.

Korbaton ĝian sub stelar’
Eksentis Ulugbek junece.
Kaj daŭras de Timur’ centjar’,
Kaj pli ĝi longas majestece!

Madrasoj sanktaj estas nun
La ejoj por la art’ kaj sentoj.
Kaj de belec’ ilia sun’
Centjarojn igis la momentoj.

La poezi’ de Navoi,
Je amo kaj je forto riĉa,

Впитали жители твои,
Она их счастьем вдохновила.

Здесь минаретов купола –
Дневные звёзды в небе ясном.
Так чистая лазурь светла
И вязь орнаментов прекрасна.

О Самарканд! Ты – мудрость лет,
Здесь рядом церкви и мечети...
В тебя влюблённым лучше нет
И краше города на свете!

О Самарканд! Живи, цвети
И славься добрыми делами!
Навстречу вечности лети
И вечно оставайся с нами.

Tre helpis al popol' de vi
Fiera resti kaj feliĉa.

De minaretoj kupolar'
Similas al stelar' ĉiela,
Beleco de la ornamar',
Lazuro pura kaj tre hela.

En saĝa urbo de l' anim'
Moske' najbaras kun preĝejo.
Por homoj, kiuj amas vin,
Vi estas bela rifuĝejo!

Ho, Samarkand', disfloru pli
Gloriĝu je bonagoj fame!
Kaj flugu al eterno vi,
Restante apud ni ĉiame.

esperantigis Vladimir Masalkin

Kelkaj klarigoj

Registan – *nomo de antikva forumo (centra placo) de Samarkando, konsiderata kiel “la koro” de la antikva urbo.*

Mirzo Ulugbek (1394-1449) – *elstara scienculo-astronomo kaj ŝtata aganto, reganto de Samarkando, nepo de Timuro (Tamerlano). En 1994 lia 600-jara jubileo estis festata sub aŭspicio de Unesko.*

Timuro (1336-1405) – *granda ŝtata aganto, farinta Samarkandon ĉefurbo de sia grandega imperio kaj multe zorginta pri beligo de la urbo, arkitekturo, ĝardenoj ktp. En 1996 lia 660-jara jubileo estis celebrata sub aŭspicio de Unesko.*

Aliŝer Navoi (1441-1501) – *granda uzbeka poeto-humanisto, kiu estas konsiderata kiel “patro” (fondinto) de literatura uzbeka lingvo.*

Madraso (aŭ **medreseo**) – *islama altlernejo aŭ universitato.*

FORPISIS LENA KARPUNINA

La 4-an de novembro 2013 forpasis pro serioza malsano membro de la Akademio de Esperanto, Lena Karpunina, rusino loĝanta en Germanujo. Ni kunlaboris kun ŝi ekde 2010, kiam ŝi estis elektita al la Akademio, ĉefe pro siaj meritoj en la literatura kampo. Ŝi fakte laboris en la Sekcioj Literaturo kaj Konsultejo de la Akademio. Ŝi estis 51-jara. La prezidanto de la Akademio Christer Kiselman esprimis al ŝiaj familianoj la kondolencon de la tuta Akademio.

La estraro de la Akademio de Esperanto



Klara Ilutoviĉ (Elektrostalĵ)

Post esperantista somero

Mi admiras vivajn gejserojn,
Promenadon laŭ la marbordo,
De delfenoj fulmajn aperojn,
Trankviligan raven de l' Nordo.

Litovio sorĉis per lagoj,
Kaj Francio – per la majest'
En somera varmo de tagoj
Dum juneca bol' de la fest'.

Bonvenige kaj senforgese,
Kiel kanta flu' de fabelo,
En la koro brilis kongrese
Sublimaĵoj de Israelo.

Diverseg' de ĝiaj pejzaĝoj,
Religioj, lingvoj, kaj ĉu
Embarasu pezoj de aĝoj,
Se l' medio plenas je ĝu'?!

De l' etoso gracon mi fidis
En la vervo, ĝoj', admirego!
Tamen fakte ĉion mi vidis,
Nur legante paĝojn de REGo!

Esperanto-bildoj abundis –
Jes, image, en la hejmi',
Sed l' impresoj vere inundis –
REGo, grandan dankon al vi!

Zamenhof-tago

Ni kunvenis por la kara festo:
Nia Majstro en la mondon venis,
Kaj decembro en jubilempesto
Lian tagon dankis kaj solenis.

La kreita lingvo vikle sonis
Honorante l' Majstron liatage.
Kion al la mondo li proponis,
Tio vivas vere, ne image.

Nia voj' ŝoseon ne similu –
Haltas ni, plu iras kaj eraras.
Esperanto venku, vivu, brilu –
Ĝian sorton ĝiaj homoj faras!

Esperantistar' fidela restu
Al la Zamenhof-ideo hela,
Ke river' de Esperanto estu
Pli profunda, vasta, loge bela!

De la 26-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 2014 la franca Esperanto-kastelo Grezillon invitas al **PRINTEMPaS** – intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1). Retejo: <<http://gresillon.org/printempo>>; kontaktoj: <kastelo@gresillon.org>; +33-241 891034; Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, France.

Por la jubileo de N.L.Gudskov

Fluu vort' al tero kaj ĉielo
Por gratuli Vin pri Via tag'!
Lumu june Via verda stelo
Kiel sorĉo kontraŭ ajna plag'!

Tra nubegoj de la vivmalhelo
Kaj danĝeroj de la tempopad'
Brilu arde Via verda stelo
Por bongusta Via pluvivad'!

Via voj', destino aŭ anĝelo
Vin defendu kontraŭ fat' kaj fal'!
Voku foren Via verda stelo
Al vastej' de l' penso kaj real'!

Venu al feliĉo de l' degelo
Ĉiu via pen', problem' kaj dram'!
Kantu ĝoĝe Via verda stelo,
Inspirante Vin por la vivam'!

Via plej feliĉa kaj ĉiam dankema lernantino Klara Ilutoviĉ

😊 AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ 😊

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo:

la ekzemplo mantras (anst. montras)

Nervskij-avenuo (anst. Nevskij)

panlingvoj (anst. planlingvoj)

Tujmeno (anst. Tjumen)

tutrismaĵoj (anst. turismaĵoj)

Lingvaj Festivaloj en Ĉeboksari...



... kaj Moskvo



Zamenhof-tagoj en Moskvo...



... kaj Jekaterinburg

